

Temoj de arto kaj politiko en la romano de *Karl Gutzkow* "Kavaliroj de spirito"

(laŭ la ekzemplo de la Biblia Nikodemio)

Tatjana AVAGJAN

Karl Gutzkow estis rimarkinda persono de la germana literaturo: ĵurnalisto, dramverkisto, prozverkisto, kiu lasis videblan spuron en la historio de la germana artpensado. Li estis unu el la gvidantoj de la "Juna Germanio", literatura skolo aperinta en la 30-aj jaroj de la XIX-a jarcento, kaj li multe faris por profesiigi la ĵurnalismen en Germanio. Lia ĉefverko post la revolucio en la jaro 1848 estas la romano "Kavaliroj de spirito" – kunfandaĵo de publicismo, filozofio kaj romanverka arto.

Karl Gutzkow interesiĝis pri la rolo de arto en la homa socio kaj politiko. Tiu temo aperas en la romano. Inter la protagonistoj, la "kavaliroj de spirito", troviĝas pentristo *Siegbert* kaj pentristo kaj inĝeniero *Leidenfrost*. Kun ili estas ligitaj la pensoj de la aŭtoro pri la arto kaj ĝia rolo en la socio. Tre gravas en tiu vidpunkto iu epizodo en la pentrista ateliero (en la 3-a volumo): temas pri diskuto inter *Siegbert* kaj *Leidenfrost*.

Siegbert estas altanima kaj revema homo, produkto de sia netrankvila epoko; li esprimas en la romano siajn ideojn cele la eblecojn de sociaj ŝanĝoj. Lia kompreno de arto estas dueca. Li konscie opinias sin adepto de la arto, pli libera de tuta "anarĥio", adepto de estetiko de "pura gusto" kaj "moderna efekta maniero", de arto kiu strebas fari tion, kion postulas la epoko kaj kio taŭgas "por la universo kaj por la honoro de la arto" (1: 3, 300).

Konvene je tiu pozicio, *Siegbert* montris en sia granda historia bildo "La morto de *Jak de Mole* en la fajro" la morton de la lasta granda magistro de Templara Ordeno, kiu estis bruligita en la komenco de la XIV-a jarcento laŭ ordono de la franca reĝo Filipo la Belulo (*Philippe le Beau*). *Siegbert* volas glorigi la magistron kiel homon spirite forta kaj sendependa de ŝtataj kaj religiaj potencoj.

La pozicio de *Siegbert* estas sincera; en ĝi romantika-filantropia inspiro kun restoj de "jungermania" idealisma kritiko de la socio kunĝas kun neakcepto de la nuna epoko. Lia frato *Dankmar* moke nomas lin "konservativa duonkomunisto" (2: 3, 174), kvankam li mem diras, ke li sentas sin "duone socialisto" (3: 1, 63). *Siegbert* estas adepto de "sociaj ŝanĝoj, kiuj donus al ĉiuj grandajn eblecojn de klerigado kaj garantiis justecon" (4: 1, 25-26). Li naive kredas je la venko de homa racio, kiu rezultus de larĝa socia pridiskutado: li opinias, ke sufiĉas pensi, sin perfektigi kaj defendi siajn ideojn, kaj "la regno de la bono" alvenos.

Tiun idealisma-romantikan mondkoncepton de *Siegbert* kontraŭstaras la skeptik-satireca mondkoncepto de *Leidenfrost*, kiu subtenas la idealisman kredon. Li ne pensas pri la ebleco de plena feliĉo por la tuta socio kaj opinias, ke estas necesa politika batalo dum konvena kaj taŭga momento.

Leidenfrost estas ne nur pentristo. Li okupiĝas ankaŭ pri teĥnologio kaj matematiko: li estas piroteĥnikisto, inĝeniero, arĥitekto. Li admiras la grandajn geniulojn de Renesanco – *Dürer*, *da Vinci*. Li insistas pri la progreso de ĉiuj kreaĵeblaj eblecoj de la homo. Lia humanismo havas natursciencajn fontojn kaj proklamas la homajn dignon kaj virtutojn, kaj samtempe li neas ĉiujn transcendantajn esperojn pri postmorta vivo. Li preferas "ĥemian" filozofion kaj "psihologian" materialismen. Per sia mondkoncepto, sia konduto kaj amo por natursciencoj li memorigas al ni *Bazarov*, la heroon en la romano "Patroj kaj Filoj" de la fama rusa verkisto *Ivan Turgenev*. *Leidenfrost* same kiel *Bazarov* estas iomgrade nihilisto – se ni komprenas la nihilismen kiel neadon de sociaj normoj.

Gutzkow tamen substrekas, ke malgraŭ la nihilismo kaj praktika vivokoncepto, la vivo de *Leidenfrost* estas romantika, aventurplena kaj neordinara. *Leidenfrost* devenas el kamparana familio, li perdiĝis en la epoko de la napoleonaj militoj, alvenis en Pollandon kaj estis edukata en katolika monaĥejo. Oni antaŭvidis ke li fariĝu pastro, sed li forkuris el la monaĥejo kaj renkontis riĉan mecenaton – diplomato, sciencisto, vojaĝemulo – kiu donis al li la eblon, fariĝi skulptisto kaj perfektigi sian inĝenieran talenton.

Leidenfrost ofte estas inter la laboristoj de la fabriko, helpas ilian edukadon kaj klerigadon, parolas kun ili pri politikaj temoj. Sed li ne komprenas iliajn verajn problemojn. Li bone konas laboristan famili-

on *Ajsold*: la gepatroj mortis, la infanoj estas devigitaj labori por vivi. Ili edukas unu la alian, vivas ĉiuj kune kaj kun la praavo en unusola ĉambro en tre malnova domo. Ilia vivo estas plena de malfacila laboro, sed *Leidenfrost* vidas ilian vivon el malproksima estetik-burĝa vidpunkto kaj opinias ĝin "idilia". Por li la arto estas ilo de aktiva influo sur la vivon kaj la eblo, ŝanĝi la vivon konforme al propraj ideoj ne nur el estetika sed ankaŭ el praktika vidpunktoj. Por li la arto estas ne io romantika, sed "io tute reala" (5: 4, 319).

Siegbert elektis por sia pentraĵo biblian temon pri Nikodemo. De kristana vidpunkto, Nikodemo estas komprenema sed nekuraĝa adepto de Kristo. Li timas la sinedrion, la superan juĝorganon de judoj, kies membro li mem estas. Pro tio li povas veni ĉe Kristo nur dum nokta mallumo. Sur sia skizo *Siegbert* pentris Nikodemon venanta nokte ĉe Kristo. Sub la ĉielo dormas la adeptoj, ne ĉiuj estas videblaj. Kristo vekiĝis kaj intencas akcepti la noktan viziton de la granda fariseo, kiu malgraŭ sia estimo por la religia doktrino de la Mesio ne havas la kuraĝon akcepti ĝin senkaŝe" (6: 3, 296).

Gutzkow vidas en Nikodemo fariseon – sed samtempe li faras paralelon kun la nuntempaj liberaluloj same suferantaj pro malkonformeco de siaj ideoj kaj kondutoj. *Siegbert* hezitas, kiamaniere prezenti Nikodemon sur la bildo: ĉu historie vere kiel riĉa burĝo aŭ ĉu konforme je lia interna kredo, jam akceptinta la novan religion kaj malriĉa. *Leidenfrost* postulas senmaskigi la vantecon, la nulecon de Nikodemo, kiu nur kaŝe kuraĝas paroli kun Kristo: "Montru al mi lian nulecon – ĝi estas signo de nia jarcento", li diras. (7: 3, 295).

Siegbert ne povas facile decidi, ĉar li komprenas la komplikitan situacion de la fariseo. Samtempe li malaprobas la "malfortecon de la nuntempaj homoj, kiuj ne kuraĝas senkaŝe proklami siajn opiniojn". Li diras al *Leidenfrost*: "Same kiel vi, mi malŝatas la homojn tre ofte renkontatajn, kiuj ne kuraĝas havi sian propran opinion; sed mi konfesas, ke mi kompatas la personojn similajn al Nikodemo. Akceptu, ke, se riĉa kaj fama sciencisto vizitus Kriston, ni konsiderus tion tute alimaniere ol la fakton, ke lin vizitas malriĉaj laborantoj kaj fiŝkaptistoj" (8: 3, 296). Jen tial *Siegbert* vidas Nikodemon alimaniere ol aliajn fariseojn.

En la romano tio dependas de la ĝenerala arto-kompreno fare de *Gutzkow*. La arto ne estas fuĝo for de aktualaj problemoj, sed ties interpretado, permesanta malkovri la historian sencon de la epoko kaj

samtempe krei artefaritan estetikan mondon, vivantan laŭ la leĝoj de belo. Ĉi tie sendube ni vidas la influon de la estetiko de *Hegel* (1770-1831) kaj ties kompreno de la idealo en la arto. "La poezio ĉiam devas montri nur energiplenan, gravan karakteron, kaj tio estas nur idealigita, tamen ne ekzistanta" (9).

En tiu konkreta okazo *Siegbert* cedas al la mendintino de la bildo, kvankam en la bildo pri *Jak de Mole* li proklamis idean arton kaj ĝian respondecon antaŭ la homaro. "Kiu alta sento labori por la nacio! Kiu feliĉo servi per sia talento la grandan kaj belan tuton!" (10: 3, 303). En siaj teorioj *Siegbert* antaŭas la postulon de ĝenerala libera arto, sendependa de klasa aparteno: "de malegala kaj terura disdivido en la socio", arto, adresita al la tuta nacio kaj edukanta ĝin. Tiamaniere, esprimante la demokratian bezonon de sia epoko en la aktiva reformanta agado, *Gutzkow* transdonas tiun funkcion al la arto.

Du aliaj pentristoj partoprenas la diskutadon pri la pentraĵo de *Siegbert*: filo de bankiero *Reichmeyer*, strebanta al la historia vero, sed "arda adepto de la nuno" (11: 3, 306), kaj *Heinrichson*, senidea formalisto kaj idolo de la aristokrataro. Ambaŭ pentristoj difinas la sferojn de arto kaj ĝian celon tute alimaniere ol *Siegbert*, *Leidenfrost* kaj, kune kun ili, *Gutzkow*. Evitante la politikon, ili proklamas formalan arton, preferantan efekton. Ilia arto estas elektita laŭ sia enhavo, "tie aperas sanktuloj, grekoj, sklavo, malriĉuloj, militistoj – ĉiuj kune, se ili konvenas al la nuna momento" (11: 3, 398). La pentristoj konfesas senkaŝe, ke la senceco de ilia arto venas de la modo. Nuntempe "la monujo de komercisto" diktas la vojon de la arto.

Nehazarde *Leidenfrost* vidas pli bone ol la aliuloj la ligojn inter estetika formalismo, bezono de burĝoj je ekstera beleco kaj socia pensmaniero. Li mem antaŭas pure praktikan, utilecan rolon de arto, ekz. ornamon de loĝejo, kvankam samtempe li postulas "partiecon" de arto, ĝian partoprenon en la lukto por la interesoj de la popolo. *Leidenfrost* tre bone komprenas pentristojn, kiuj preferas ornami pipojn aŭ telerojn.

Por precizigi sian pozicion, li faras propran skizon de bildo pri Nikodemo kun la titolo "Tute kaj duone" ("*Die Ganzen und die Halben*"). La skizo enhavas tri grupojn. Meze, sur monta deklivo, staras preĝantaj viroj, virinoj kaj infanoj kun okuloj levitaj al la ĉielo. Ili revenas de Kristo, kiun oni ne vidas, sed kies ĉeeston oni sentas tie, kie videblas la flamo de la vespera suno, formanta kvazaŭ pordegon

al la ĉielo. En dua grupo, je la dekstra angulo, staras fariseoj, fanatikaj kaj netoleremaj. Pugnoj kaj ŝtonoj minacas la adeptojn de Kristo. En la sama tempo, vidata de neniuj, Nikodemo iras dumnokte al la lumo. La ruinoj de malnova katedralo kaŝas lin for de ĉies okuloj.

Kontraŭe al la bildo de *Siegbert*, ĉi tie Kristo ne estas videbla, sed anstataŭita per suna lumo. *Leidenfrost* lasas nesolvita la problemon: kiu vero estas la fonto de la lumo? Kiu povas esti tie: "Ĉu Kristo aŭ Sokrato"? (12: 4, 12). Do, ni ne scias, kiun veron ekvidis Nikodemo. Eble kiel skribas *H. Kaiser* "en tiu skizo esprimiĝas la tuta komplik-eco kaj neklareco de la pozicio de liberala humanismo" (13: p. 29). La popolo vidas la lumon. Nikodemo same ekvidis la lumon. Sed ĉu li vidas la saman lumon, la saman veron? Ĉu vere la popolo komprenis la novan doktrinon – aŭ nur Nikodemo pensas, ke ĝi komprenis? Nehazarde "dumtage" li ne kapablas solidariĝi kun la popolo kaj proklami sian novan kredon.

Miksiĝo de natur-juraj kaj sociaj kategorioj, malamo kontraŭ regantoj kaj timo antaŭ la subpremitaj klasoj, plena neklareco en sia morala kaj politika strebado ŝanĝi la ekzistantan mondon – jen la karakterizo de Nikodemo, kaj same – de nuntempa liberalulo. Tiu-maniere *Gutzkow* respegulis sian epokon: "Kontraŭstaro inter plej bonaj ideoj kaj la tera graviteco ĉe miloj da homoj".

Notoj

1 – 8 kaj 10 – 12: *Gutzkow Karl: "Die Ritter vom Geiste" in 9 Bänden* (Kavaliroj de Spirito, en 9 volumoj), *Leipzig*, 1857. (Validas por notoj 1 – 8 kaj 10 – 12. La unua cifero estas la numero de la noto, la dua estas la volumo de la libro, la tria estas la numero de la paĝo.)

9. *Hegel: "Prelegoj pri estetiko"*, Moskvo, 1955, p. 168

13. *Kaiser H.: "Studien zum deutschen Roman 1848"* (Studoj pri la germana romano 1848), 1977, p. 29

Adreso de la aŭtoro

D-ro AVAGJAN Tatjana Ivanovna
Lesnoj Projezd, d.8, kv.28
RU 450 071 Ufa / RUSIO

Priaŭtora informo

La aŭtorino estas doktoro pri filologio. Ŝi laboras en la filologia fakultato de Baŝkiria Ŝtata Universitato, kie ŝi instruas historion de Okcidenteŭropa kaj Usona literaturo kaj kulturo. D-ro *Avagian* estas fakulo pri germana literaturo (aparte pri tiu de la XIX-a jarcento) kaj multe okupiĝas pri problemoj de germana filozofio kaj estetiko.

Scienca eĥo

Kula flugado dumpluva

Kiel kuloj kapablas flugi dum pluvo?

Se flankenlasi ke la „homo saĝa“ jam spertis multajn ekzemplojn pri la postviv-ruzeco de kuloj (precipe de ties inaj aktivuloj), tamen estas surprize, ke eĉ subita kaj torenta pluvoverŝo neniel povas ataki flugantajn kulojn. Nu, ili ne dronas ĉar ĉiu unuopa pluvero kaŭzas malgrandan prem-ondon, kiu sufiĉas, ke la kulo povas ĝin pretergliti. La pluvero rapidegas kontraŭ la kulo (kvazaŭ rapide veturanta aŭtomobilo rapidegas kontraŭ aerbalono) kaj tiu estas forpremata el la vojo. Tial la saĝa homo ja enmetis en sian muŝbatilon multajn etajn truojn, por ke, dum batado, la prem-ondo malaltiĝu. Tamen kulbatado restas malfacila entrepreno.

(2004-01-18/19)

La olda Breĉo

Kiun vivaĵon ne ŝatis la aŭtoro?

La „Breĉo: Vivo de animaloj“ („*Brehm's Tierleben*“) kaj ties popularan priskribon de la naturo kaj bestoj konas preskaŭ ĉiu germano, ĉu juna ĉu maljuna. Malpli konataj estas la unuaj eldonoj de „Animala Vivo“ fare de *Alfred Brehm* (1829-1884), la t.n. „pra-Breĉo“ (*Ur-Brehm*). En tiuj plej fruaj verkoj la aŭtoro senĝene skribis kion li pensis. Kaj kiam io ne interesis lin (ekz. insektoj, vermoj kaj moluskoj), tiam li donis la temon al aliuloj. Sekvas specimeno por „gustumi“ la plezurigan skribostilon de la olda Breĉo: „Estas nur malmultaj aliaj bestoj kiuj estas tiom nesocietemaj kaj kiuj kondutas tiom abomeninde – eĉ kontraŭ samspeculoj! – kiom la sorikoj. Eĉ la malsamseksaj partneroj ne vivas kune en paco – escepte en la pariĝa sezono. Dum la postrestanta tempo de la jaro ĉiu soriko formanĝas la alian, se ĝi povas superforti tiun. Estas vere bonŝanco, ke sorikoj ne atingas grandecon de leono: ili senbestigus la tutan Teron kaj fine devus morti pro malsato...“.

(2004-10-17)

Antikva ginko

Kiam alvenis la ginko en Eŭropon?

La ginkoarbo el la klaso de ginkacoj (*Ginkgoaceae*) venis nur fine de la 18-a jarcento al Germanujo – fakte al la urbo Vejmaro (*Weimar*), kie la „ĉina temploarbo“ trovis specialan amikon: la grandan poeton *J.W. von Goethe*, kiu eĉ dediĉis poemon al la stranga arbo. La ginko venis el Ĉinujo kaj trapasis Japanujon, kie ĝin malkovris kiel oftan arbon en temploj la germana kuracisto d-ro *Kaempfer*, kiu laboris por la Nederlanda Orient-Hindia Kompanio. En 1730 *Kaempfer* alportis la unuan ekzempleron en Nederlando, kaj nur en la jaro 1754 estis vendita ginkoarbo al unu el la Reĝaj Botanikaj Ĝardenoj en *Kew* apud Londono. Tie ĝi ankoraŭ nun-